3-a Jaro. N-o 55 (105) APERAS SEMAJNE 30. Septembro 1926



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto : E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XII	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XX	Administranto : R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

LA TUTMONDA EKONOMIA INTERDEPENDECO

La traduko, kiun ni prezentas hodiaŭ al la legantoj de SENNACIULO *estas farita el « Les Contradictions du Monde Moderne » (La Kontraŭdiroj de la Moderna Mondo) de Francis Delaisi (Delezi). Ĉi aŭtoro estas sufiĉe fama pro siaj ekonomi-politikaj verkoj. Liaj vastaj konoj faras el li unu el la plej klarvidaj homoj, rilate mondpolitikon. Antaŭ la mondbuĉado li tre precize antaŭdiris la venontan militon.*

Sub formo populara, kelkfoje amuza, li scias pli bone ol multaj aliaj ekonomiistoj komprenigi komplikajn demandojn. En sia lasta, 560-paĝa verko, li pruvas nerefuteble, ke la mondo vole-nevole devos unueciĝi, senlimiĝi. Li akcentas, ke nun ĉefe malhelpas, prokrastigas tiun procezon (1)*, la popola psikologio, la subjektivaj fortoj, kiuj tre malfruas rilate la ŝanĝojn, jam okazintajn en la mondo. Ĝis kiam tiuj senpezaj fortoj estos adaptiĝintaj, konformiĝintaj al la realo, regos krizoj, suferoj, militoj.*

Sekve unu el la plej urĝaj kaj pozitivaj taskoj de la klarvidantoj estas labori por aliigi la rutineman, la nacieman menson de la homoj. Unuvorte, necesas fari grandskale kion SAT faras modeste jam de kelkaj jaroj. — Trad.

(1) Progreso, evoluo, irado, funkcio, ktp.



La terglobo vere fariĝis ununura estaĵo. Tio ne estas simpla imagaĵo, ia teoria aŭ poezia koncepto, inventita por impresi nian imagpovon. Por konscii ĝian realecon, sufiĉas nur atente prikonsideri niajn hejmajn objektojn, kaj la plej oftajn agojn de nia vivo. Ni tuj vidos, ke la tuta socia korpo estas internaciiĝinta.

Ni prikonsideru la hodiaŭan vivon de iu burĝa Parizano.

Matene, tuj post kiam li ellitiĝis, S-ro Duran uzas por sin lavi sapon, fabrikitan per araĥiso el Kongolando kaj sekigas sin per viŝtuko el Luiziana kotono. Poste li sin vestas : lia ĉemizo, lia kolumo estas el Rusia lino, liaj pantalono kaj jaketo el lano alportita de Aŭstralio ; li ornamas sian kolon per kravato el silko farita el japanaj kokonoj ; li vestas siajn piedojn per ŝuoj, kies ledo devenas el argentina bovhaŭto, tanita per germanaj kemiaĵoj.

En lia manĝo-ĉambro — meblita per holanda telermeblo, farita el ligno veninta de hungaraj arbaroj — li trovas surtable arĝentanan manĝilaron, faritan el kupro de Rio-Tinto, el Hispana stano, el Aŭstralia arĝento. Antaŭ li kuŝas freŝa pano, farita el tritiko, kiu, laŭ la sezono, venas de Francio, krom se ĝi ne venas de Rumanio aŭ de Kanado. Li manĝas ovojn ĵus alvenintajn de Maroko, pecon da ŝafaĵo, kiun eble malvarmigilhava ŝipo kunportis de Argentinio, kaj konservitajn pizetojn, kreskintajn sub la Kalifornia suno ; kiel deserton li manĝas anglan konfitaĵon, faritan el francaj fruktoj kaj sukero de Kuba, kaj li trinkas bonegan tason da Brazilia kafo.

Tiele satigite, per aŭtomobilo, fabrikita en Usono, li veturas al sia oficejo. Tie, post kiam li legis pri la kursoj ĉe la bankoj el Liverpul, London, Amsterdam aŭ Jokohama, li diktas sian leteraron, kiun skribas angla maŝino kaj li subskribas per Usona fontoplumo.

En liaj laborejoj funkcias maŝinoj, (konstruitaj en Lotaringio, laŭ germanaj patentoj kaj movigataj per angla karbo), kiuj fabrikas, per materialoj de plej diversaj devenoj, « Parizajn artiklojn » por Braziliaj klientoj. Li ordonas, ke oni ekspedu tiujn artiklojn al Rio-de-Janeiro per la unua germana ŝipo, kiu haltos en la haveno de Cherbourg (Ŝerbur).

Poste li vizitas sian bankiston por enspezi florenan ĉekon de holanda kliento, kaj aĉeti sterlingajn funtojn por pagi anglan liveranton. La bankisto profitas la okazon por rimarkigi, ke lia konto estas sufiĉe kredita, kaj ke la petrolaj akcioj tendencas plivaloriĝi. Li konsilas aĉeton. S-ro Duran lasas sin konvinki, sed, ĉar li ne volas meti ĉiujn siajn ovojn

en la saman korbon (1), li ordonas aĉeti samtempe kvar akciojn de *Royal Dutch* (Rojl Daĉ) kaj dek de franca kompanio aniĝinta al *Standard Oil* (Standard Ojl).

Post tio, kontentigite pro bonaj negocoj, li proponas al sia edzino viziti teatron. La sinjorino sin vestas per sia plej bela robo (aĉetita ĉe la firmo Paquin (2), per sia kapuĉmantelo el haŭto de blua vulpo (el Siberio), siajn diamantojn el Sud-Afriko, kaj ili iras vespermanĝi en « italan restoracion ». Tie ili diskutas por decidi ĉu ili iros por vidi « rusajn baletojn » aŭ por aŭskulti en *music-hall* (miuzik-hol) (3) la faman Raquel Meller — krom se ili ne preferus ĉeesti prezentadon de teatraĵo de Gabriele d'Annunzio, ludita de Ida Rubinstein en dekoracio de Bakst.

Fine, post noktomanĝo en « kaŭkaza » drinkejo, kie sonas negra muziko, ili hejmen revenas. Kaj, lacigite per tiom da zorgoj kaj amuzoj, S-ro Duran, kovrite per piedkuseno (el plumoj de norvegaj anasoj) ekdormas, revante, ke Francio estas granda lando, kiu produktas ĉion kaj mokas la ceterajn landojn...

Ne necesas insisti plu. Ĉu temas pri nutraĵo, vestoj, laboro, amuzo; ĉiu el ni estas dependa de ĉiuj mondpartoj. Ni ne povas fari geston, ne alilokante iun objekton, venintan el plej malproksima regiono, kaj reciproke ĉiu grava okazaĵo sur la terglobo postefikas sur niajn vivkondiĉojn. La moderna homo vere estas mond-civitano.

Sed pri tio li ne konscias; kaj ĉi tie kuŝas la kaŭzo de la terura situacio, en kiu baraktas la nuntempularo, kiu vane provas sin savi per kontraŭdiraj rimedoj.

Elfrancigis E. L.

(1) Ĉar li ne volas riski sian tutan monon en sama entrepreno.

(2) Fama Pariza tajloro por virinaj vestaĵoj.

(3) Koncertejo.

La jubileo-ĉeno de SAT

K-do M. VAN AELST donacas 10 fr. b. kaj alvokas al K-doj BASTELS, SPRINGAEL (Bruxelles), L. VIGNA (Paris) kaj K-do HARMS (Hamburg), ke ili ankaŭ kunhelpu en la forĝado de la jubileo-ĉeno de S. A. T.

Agonias
la nuna reĝimo hispania

Militista ribelemo en militista reĝimo.

La faktoj klare vidigas al ni, ke la fortoj malkontentaj amasiĝas ĉiam pli kaj pli kontraŭ la nuntempa aĉa registaro. Dum la epoko kiam regis politikistoj, la militistaro kontraŭstaris ĉi tiujn per la « Defendaj komitatoj ». Tiam, kvankam ŝajne regis civiluloj, ĉi lastaj ĉiam cedis ĉe la militistaj minacoj. Neniam en Hispanio estas la militistaro je la dispono de civilaj reĝimoj. La civiluloj ĉiam submetiĝis sub militistaj botoj!



Ili certe ankaŭ voĉdonis por lia diktatora moŝto.

Sed kion ni vidis lastatempe? Ni vidis militistojn ribeli kontraŭ alifakaj sammetiuloj; sed ĉi lastaj ne estas politikistoj; ili estas armitaj homoj, kiuj agis konsekvence proklamante militan staton en la tuta regno, maldungante kaj malmobilizante la artileriajn trupojn. Nun la artilerio estas de neniu zorgata en la lando regata de militistoj. Venkis Primo de Rivera.

Subjektivaj kaŭzoj de la ribelemo de la artilerianaro kuŝas en ia fiereco korpusa. La « sciencaj korpusoj » (artilerianoj, inĝenieroj, maristoj, milita saneco) pli malpli malŝatas la « malsaĝajn korpusojn » (infanterio, kavalerio) kies generaloj regas la landon. (P. de Rivera, Anido...).

Ĉi tiuj generaloj, nature provas submetigi la sciencajn korpusojn al siaj humiligaj kaj malsaĝaj ordonoj. Sed la militistaj scienculoj pro memestimo kaj fiereco ne povas akcepti tian staton. Momente la stato kvietiĝis, sed la kreskantaj, sin kaŝantaj fortoj provos kredeble estonte altrudi sian volon.

★

Cenzurenda falsajego.

La eta partiaĉo « Patriota unio », kreita de la nuna registaro, organizis per la helpo de ĉi lasta tutnacian kaj eĉ eksternacian kolekton de subskriboj, unue por fanfaroni kaj pruvi, ke la nuna politika reĝimo estas amata de l'plejmulto da hispanoj kaj due por ĉikani nesingardemulojn. Jen K-doj la rimedoj uzitaj por la subskribkolektado :

Unue granda propagando per afiŝoj kaj gazetoj.

Due, avizo al ĉiuj industriistoj kaj komercistoj, eĉ la plej etaj, por ke ili subskribu.

Trie, subskribigo de ĉiuj ŝtataj kaj urbaj oficistoj, de « somatén » (burĝaro armita) kaj militistoj.

Kvare, komisioj (el plej malindaj personoj) vizitis loĝejojn, butikojn kaj industriejojn por kvazaŭ minacante, kolekti subskribojn. Ofte tiuj ĉi komisioj estis akompanataj de polic-inspektoro.

Kvine, la membro de « Patriota unio » senĉese vizitis ĉiujn urbajn ejojn kaj plurfoje subskribis. Oni subskribis nome de mortintoj kaj eĉ de neekzistantoj. Sese, la sekretarioj de la vilaĝoj enlistigis ĉiujn enloĝantojn kaj sendis la kompletan liston al la provincestroj. Teroro kaj minaco estas uzataj por la « nobla » celo. Tiele oni kolektis « milionojn » da subskriboj.

Tio, K-doj, estas la vero; abundegon da faktoj mi povus citi pri tiu falsegaĵo. Estas vere naŭzega kaj neelportinda rimedo. Neniam estis tiom da malkontentuloj kiel nun. Ĉu ĉi lasta fakto kaj hontinda regmaniero de nia diktatoraĉo ne signas la agonion de la nuna reĝimo en la monarka Hispanio?

M. GEOFFROY.

Situacio de oficistoj en Oriento

Vivkondiĉoj de oficistaro en Oriento estas tre ne kontentigaj. Nur sensignifa procento da supera oficistaro ricevas altan salajron por fidela servo al Eŭropa imperialistaro aŭ enlanda burĝaro. Sed la granda amaso da komercindustriaj kaj malsuperaj oficistoj vivas tre mizere. En kelkaj landoj batalado por plibonigi la vivkondiĉojn estas eĉ malfaciligata per polica persekutado, per foresto de rajtojn de koalicio, ktp.

Jen kelkaj faktoj: En la plej riĉa kaj kultura lando de Oriento — Japanio — la buĝeto de oficisto estas jena :

Monata enspezo	122,81	ienoj
— elspezo	130,49	—
Deficito	7,68	—

En Egiptio 77 % el ĉiuj oficistoj en regnaj kaj privataj entreprenoj kaj kontoroj ricevas 1 - 5 Egiptan funton (5 - 25 dolarojn) pomonate. Indekso de vivo por 1914 plialtiĝis ĝis 163 %, sed nominala salajropago restis ne ŝanĝita. En julio 1926 oficistoj de Egiptaj regnokontoroj turnis sin al la parlamento kun peto pridiskuti ilian situacion. En sia skribo ili petas: 1) permesi dusemajnan ripozon ĉiujare; 2) pagi por festaj tagoj; 3) pagi al malsanuloj por la unuaj 15 tagoj la tutan salajron; 4) por la sekvantaj 15 tagoj 50 % el monata salajro; 5) registaro ne prenu procentojn el pensioj, kiujn oni donas al familioj de mortintaj oficistoj, kiel okazas nun, sed la familioj ricevu la tutan pension; 6) se oficisto estas maldungata, la registaro donu al li monhelpon.

Kiel respondo je tiu peto, la registaro komencas... malgrandigi etatojn je 20-25 %...

Sindikato de komercaj oficistoj en Aleksandrio sendis al Zaglul-Paŝa sciigon por informi lin pri situacio de siaj membroj kaj pri tio, ke ili postulas pli altan salajron, sep-horan labortagon, unu ripoztagon en semajno, rajton maldungi oficistojn nur post difinita elprovo, kaj vicon de aliaj postuloj, kiuj limigas arbitron de l' estraro.

Al tiu petskribo respondo ne estis farata.

En Alĝerio kaj Tunizio oficistoj de militoficejoj, post senfruktaj klopodoj, decidis, kiel informas « L'Humanité » (La Homaro), aranĝi ĝeneralan strikon.

Se tiel estas en landoj, kie ekzistas sindikatoj de oficistoj, do oni povas facile imagi, kia situacio estas tie, kie profesiaj unuiĝoj estas leĝe malpermesataj, ekzemple : Turkio, Persio, Sirio ktp. Pri netolerebla situacio de oficistoj en la laste nomitaj landoj elokvente parolas jena originala formo de striko, kiun faris urbaj oficistoj en Bejruto : *ili rifuzis ricevi salajron ĝis kiam ĝi estos altigita...*

Tia « orienta striko » similas pli bone al mallibereja malsato aŭ ekonomia « ĥarakiri » *) kaj atestas pri suferoj de la orienta oficisto, batita de mizero kaj senrajteco.

URMANLJIK.

El *Naŝa gazeta* (Nia ĵurnalo) organo de l' sindikato de oficistoj USSR, trad. *5500*.

Laborista Gimnast- kaj Sport-Lernejo

La 18.-19-an de septembro, okazis la solena malfermo de la unua lernejo de la « Laborista Gimnast- kaj Sport-Asocio » germania en Leipzig. Tio pruvas, ke la laborista sportmovado en Germanio jam estas sufiĉe forta. Ĝis nun eĉ la burĝa sportmovado ne povas montri tian grandiozan lernejon. Tiu lernejo, kiu ne nur celas, eduki siajn vizitontojn en gimnasto kaj sporto, sed samtempe akcelos la politikan laboristan kleriglaboron, estos nova fortikaĵo de la germana, eĉ de la tutmonda Proletaro.

La 19-an matene, je la 9.30-a horo, komenciĝis la malferma kunveno solena en la novkonstruita lernejo. K-do Gellert, la gvidanto de la asocio, salutis la gastojn kaj skizinte la historion de l' lernejo, solene transdonis ĝin al la gvidanto, K-do Benedix. Sekvis salutoj de diversaj organizoj kaj instancoj enlandaj kaj eksterlandaj, regnaj, landaj, urbaj ktp.

La paroladoj faritaj dum la solena malfermo estis disaŭdigataj per la Leipziga radiosendstacio « Mirag » ; eksterlande oni do povis silente partopreni. Sed... kiam ekparolis reprezentanto de la germana komunista Partio kaj de Komintern, « Mirag » interrompis la disaŭdigadon...

La 20-an matene, tramarŝis Leipzigon multaj gimnast- kaj sportistaroj, ludantaj fajfilojn kaj tamburojn. Antaŭtagmeze la samaj aroj ludis komune (5.000 personoj) sur la « Aŭgustus-Platz » (placo de Aŭgusto). Estis la unua fojo, ke tiom da laboristaj fajfistoj kaj tamburistoj komune ludis. Impreso fortega kaj bona.

Posttagmeze, de 1.30a ĝis 2.30a horo, okazis sur la sama placo liberaj gimnastekzercadoj, kiuj partoprenis kelkaj miloj gegimnastuloj kaj gesportuloj.

Kiam finiĝis la gimnastekzercadoj, alvenis la kurantoj de la t. n. « stelkurado » (?). El ĉiuj direktoj alvenis salutleteroj en fermitaj tuboj. transportitaj de multaj miloj da kurantoj tra la tuta regno el Belgio, Aŭstrio, Estonio, Danio, Svisio ktp.

Poste formiĝis aroj el manifestantoj marŝontaj al la nova lernejo. De tie pli ol 10.000 da sportuloj pluen marŝis al la sportparko de la gimnast- kaj sportunuiĝ « Vorwärts-Leipzig-Süd » (Antaŭen-Leipzig-Sudo). Tie okazis la prelegado de la salutleteroj, pluraj liberaj gimnastekzercadoj, muzikludoj ktp.

Entute la festo estis granda paŝo antaŭen en la intereso de la laborista gimnast- kaj sportmovado. La Laboristaro grandamase partoprenis kaj per tio pruvis sian simpation, dume la burĝaro iom konsternite rigardis la feston de malproksime.

Proleta Esperanto-Gazetservo.

*) Disvastigita en Japanio moro memmortigi.

TIE ĈI KAJ TIE

Postuloj de la moderna tekniko.

Ĉe la kongreso de la Internacia Transportista Federacio, okazinta lastatempe en Paris, la francoj antaŭmetis rezolucion cele al unuformaj, facile kompreneblaj vojmontriloj, prikonsentitaj internacie kaj uzotaj devige ; ĉar motoristoj ofte vojaĝas en aliaj landoj kaj scias ordinare nur sian gepatran lingvon, pro tio ili ne komprenas la direktilojn kaj endanĝerigas sian vivon kaj tiun de aliaj personoj.

La britoj rekomendis, ke ĉesu la kutimo laŭ kiu maristoj malŝarĝas varojn kaj funkciigas levturnilojn, ne nur ĉar tiele ili anstataŭas dokistojn, sed ĉar la lingva malfacilaĵo igas akcidentojn pli oftaj.

★

Notinde.

Pri la ĉi supre menciita kongreso oni povis legi en la ĵurnalo « Le Peuple » (La Popolo) la jenon : « K-do Fimmen, la ĝenerala sekretario, ricevas la parolon kaj tuj rediras france kaj angle la paroladon, kiun li faris hieraŭ germane... »

Nu, ni ĉesu aserti, ke la laboristaj gvidantoj bezonas tradukistojn por komprenigi sin ĉe internaciaj kongresoj !!?

★

« Libera Societo ».

Tia estas la titolo de komunumo, kiun projektas fondi judaj K-doj en la ĉirkaŭaĵo de Los Angeles (Kalifornio). Jam multaj aliĝis kaj fervore klopodas por sukcesigi la entreprenon. Interesatoj sin turnu al K-do A. Rogat, 3185 Blanchard Street, Los Angeles, Kalifornio, Usono.

Laborkonfliktoj en Islando

Eĉ en malproksima Islando la moderna labor-problemo aperas kun la disvolviĝo de industrio. Per la apliko de vaporo al la ŝipoj, fiŝkaptado fariĝas grand-industrio ; la salajruloj iĝas klaskonsciaj, formas sindikatojn, kiuj kuniĝas en nacia federacio ; la mastroj siaflanke formas asociojn, kvankam tiuj ĉi ne ankoraŭ federaciiĝis. Organizitaj strikoj kaj mastrostrikoj fariĝas oftaj, speciale en Rejkjavik, la ĉefa haveno de la trenretoŝiparo.

Post pli ol unu klopodo farita de la registaro kaj de privataj parlamentanoj por organizi la akordigon de laborkonfliktoj, propono prezentita de privata parlamentano, kaj apogita de mastroj kaj laboristaj sindikatoj, fariĝis leĝo la 27-an de junio 1925.

Tiu ĉi leĝo starigas komision, kies la Federacio de Sindikatoj nomas kvin membrojn, la Federacio de Mastroj (aŭ ĝis kiam tia organizo fariĝis la Asocio de Posedantoj de Trenretoŝipoj) kvin membrojn, kaj la Superega Juĝistaro la prezidanton. La Komisiono nomas akordigantan oficiston, kun aprobo de la Ministerio de Industrio.

Ĉiuj sindikatoj kaj mastroj devas sendi kopiojn de iliaj kolektivaj kontraktoj al la akordiganta oficisto, kiu rajtas interveni, kiam ajn li opinias, ke ekzistas danĝero pri laborkonflikto. La koncernatoj devas doni ĉiujn necesajn informojn.

La aŭtoritatoj povas postuli, ke la proponoj de la akordiganta oficisto estu submetataj al la membroj de laboristaj sindikatoj kaj mastraj asocioj por ĝenerala baloto.

La unua akordiganta oficisto estis nomita en septembro 1925 kaj antaŭ la fino de la jaro li akordigis tre gravan konflikton pri salajroj en la fiŝkapta industrio.

El la *Bulteno de Internacia Labor-Oficejo.*

Domsklaveco en Sierra Leone

La Brita ŝtatsekretario por la kolonioj, respondante al demando farita en la Deputitaro la 30-an de novembro 1925, diris ke komerco pri sklavoj estas leĝe punata en la Protektorato de Sierra Leone, kaj ne estas motivo por kredi, ke aktiva komerco ekzistas. Tamen la posedo de sklavoj ne estas punebla, kvankam la rajto por posedi ilin ne estas akceptata kaj ne povas esti leĝe efikigata.

En sia parolado ĉe la malfermo de la nova kunsido de la Leĝdonanta Konsilantaro, lastan novembron, la Guberniestro de Sierra Leone anoncis, ke projekto de leĝo estos proponata por ordoni ke :

1. ĉiuj personoj naskitaj en la Protektorato aŭ kondukita tien estos deklarataj liberaj ;

2. ĉiuj personoj traktataj kiel sklavoj aŭ tenataj laŭ iaspeca servuto fariĝos liberaj ĉe la morto de ilia mastro aŭ posedanto ;

3. Neniu postulo por aŭ pri la posedo de sklavo estos akceptata de iu el la juĝistaroj de la Protektorato.

El la *Bulteno de Internacia Labor-Oficejo.*

Finalo 1848

Martaj ventegoj uraganis tra la lando. Sunbrilo alternis kun pluvo kaj nebulo. En la sino de la tero kaj en la ĉeloj de la plantoj bolis la vivo sanktigita de la suno kaj premis eksteren. En la popolkorpo bolis la sango kaj ekŝaŭmis kiel katastrofiga ondego.

Maltrankvilo regis en la lando; kaj en la stratoj de la alitempe tiel kvieta kaj kontenta saksa urbo turiĝis barikade ĉaroj, mebloj kaj pavimŝtonoj. La iam trankvilaj stratoj eĥis de la batalbruo.

Uniformitaj homoj alkuris kontraŭ la barikadoj okupitaj de la liberecbatalantoj. Batalis la demokratio kontraŭ la despotio *).

Trankvileco ekestiĝis en la urbo. Virinoj kaj infanoj vagadis kaj serĉis inter la mortigitoj siajn karulojn. Jen oni trovas la patron, vestitan ankoraŭ per la laborejvestaĵo, kuŝantan kun dispecigita kranio sub renversiĝinta ĉaro. Tie kuŝis la frato, disŝirita per grenado kaj katenita per la propraj intestoj. Kaj jen, laŭlarĝe super la barikado pendis junaĝa homo, portanta la ŝnurumitan jakon. La bela, blanka frunto estas traigita per kuglo kaj etaj sangogutoj falis el lia studenta ĉapo. Vunditoj ĝemis kaj la plorado de la inoj kaj infanoj penetris en la silentajn domojn.

Ekstere en la kampoj, kie ĵus la printempo naskiĝis, oni batalis por la lasta decido. Multaj el la liberecbatalantoj sterkis per sia sango la hejmecan teron kaj kolorigis la barikadojn.

Aretoj da kurbiĝintaj viroj kaj junuloj, eskortitaj per ĝisdente armitaj soldatoj migris al la urbo en la grandaj malliberejoj. Birda kantado kaj printempa flustrado akompanis ilin.

La batalo estis finita kaj la revolucio subpremita.

Sufokiga somero regas super herbejoj kaj kampoj. Jen marŝas el la urbo trupo militista, kondukanta ĉen-katenigitan viron. Ĝis sur la sabla monteto ili akompanas lin.

Betul- kaj salikbranĉoj ĉirkaŭas la junece belan kapon de la junulo kaj karese ludas la vento en lia nigra bukla hararo.

Profunde enpenetras la simbolo de la batalanta kaj suferanta junularo en la memoron de la ekzekut-rigardontoj. Ankoraŭfoje la junulo superrigardas sopirokule la florantan hejmon kaj melankolie sonas tra lia animo: « Kaj se kiel regantoj la princoj ne estus solaj, Germanio, Germanio, kiel bela vi povus esti!... »

Ektremas la aero pro la krako de la ok pafiloj. Ne plu batas koro. « Super ĉiuj montoj silento!... »

El la *Prol. Heimstunden* (Hejmaj horoj), jarkolekto 1924.

Esperantigis Roberto E. Bitzer.



*) Kutime oni uzas ĉi-kaze « despoteco »'n aŭ « despotismo »'n. Sed ni tamen lasas la formon *despotio*, kiu montras ian analogion kun *demokratio*. Estas ĉi-okaze interese noti la gravan rolon, kiun ludas en vivo de lingvo la proanalogia leĝo. — *Red.*

☆ DISKUTEJO ☆

Ĉu Marks eraris?

(*Daŭrigo* *))

La britia ekzemplo

Depost sia unua apero en la Historio, la scienca socialismo devis elteni la plej furiozajn atakojn de la burĝaro. La kapitalista klaso, diris foje Karl Kautsky, kompatas la mizeran, humilan proletaron kaj penas mildigi ĝiajn penojn per almozoj, sed ĝi fariĝas malamikeca, ŝtonkora, kruelega kontraŭ postulantaj kaj batalemaj salajruloj. Dum la projektoj de la socialistoj utopiaj preskaŭ ne tuŝis la burĝaron, la marksismo, per sia proklamo, ke la laboristoj devas *mem* sin liberigi, estas rekta, kruda minaco al la ekzistanta reĝimo. Konscia pri la marksa parolo, ke « teorio fariĝas materia forto kiam ĝi ekkaptas la amasojn », la kapitalistaro bataladas jam tri kvaronojn da jarcento per ĉiuj rimedoj kaj sur ĉiuj frontoj kontraŭ la marksismo, kaj ĝi uzas perforton kaj ruzon, materian kaj spiritajn armilojn, senescepte.

En Hungario, Horti bruligis la marksistan literaturon; la batalkrio de la faŝistoj ĉiulandaj estas: « For la marksismon! » kaj eĉ la Viena polico (ĉe kiu estas tre spertaj esperantistoj!) antaŭ nelonge, je la internacia kongreso de la instruistoj, perforte forigis el la kongresejo afiŝojn, sur kiuj troviĝis frazoj de Karl Marks. Apud la larĝpugnaj, etcerbaj policanoj ni vidas en la kontraŭmarksa batalfronto la burĝan profesoraron, malpli larĝpugnan, sed ne malpli etcerban. Universitataj profesoroj fabrikis kaj fabrikas laŭordone kaj laŭmende « marksrefutaĵojn ».

Unu el la plej ofte ripetitaj argumentoj de tiuj « profesoroj » estis, dum la dua duono de la pasinta jarcento, la *britia ekzemplo*. La britia industrio pli kaj pli kreskadis, malvolviĝis, pliperfektiĝis; la laboristaro plimultiĝis, koncentriĝis kaj fondis grandajn organizaĵojn; sed la marksa tezo pri grandiĝanta mizerigo ŝajnis malpravi, kaj klaskonscio kaj batalemo forestis. Anstataŭ luktadi, la anglaj laboristoj preferis intertrakti kun siaj kapitalistoj; anstataŭ klasbatalo, ilia devizo estis socia paco. Kaj se ili tamen batalis, iliaj celoj estis limigitaj al pure profesiaj, mallarĝaj, branĉaj demandoj; en ĉiuj bataletoj, ili vidis ne la ĝeneralan intereson de la tuta klaso, sed sian specialan erintereson; ne la fincelon de socialismo, sed nur ercelon de tuja, malgranda sukceso.

La foresto de proleta klaskonscio kaj de socialista ideologio en la britia laborista movado de la dua duono de l' pasinta jarcento estis konsiderata de la burĝaj profesoroj kiel refuto praktika de la marksa teorio. Marks ja montris al ni, ke malvolviĝo de la kapitalista produktadordo kaj centralizo de la industrio kreskigas ne nur nombron kaj koncentrigon de la proletaro, sed ankaŭ ties mizeron kaj batalemon, ties klasan kaj socialistan konscion. La faktoj ŝajnis senesperige mortigi la marksan teorion kaj la burĝaj profesoroj ekaperis kiel la grandaj venkintoj de la danĝera malamiko de l' ekzistanta ordo.

Tamen, tiuj famaj « sciencistoj » forgesis, pro sia marks-mortiga ardo, ke en la unua volumo de sia ĉefverko « La Kapitalo » (aperinta en 1867), Marks liveras la ŝlosilon por kompreni la ŝajnan kontraŭdiron. Marks tie klarigas, ke entrepreno, uzante pli perfektan ilaron aŭ maŝinaron ol la granda amaso de samspecaj produktejoj, povas produkti dum sama tempo pli grandan kvanton da produktaĵoj, aŭ po varpeco malpli kare. Sed ĉar la pli perfektaj maŝinoj aŭ laborprocedoj estas ne ĝenerale aplikataj, sed esceptoj, la valoro de la produktaĵoj estas ĝenerale determinata de la *socie necesa* — t.e. sub mezaj kondiĉoj necesa — labortempo. Tiamaniere la mastro de la escepte pliperfekta entrepreno povas vendi siajn produktaĵojn je la ĝenerala, socia valoro (aŭ nur iomete malpli kare), kvankam la individua valoro de ĉiu varpeco, ĉe li produktita, estas malpli alta, ĉar reprezentanta malpli da laboro. Tiu diferenco donas al la posedanto de teknike progresinta entrepreno ioman *super-profiton*, super la meza profitnivelo (1), dank' al la monopolo de la teknika supereco.

Tiaj monopoldevenaj ekstraprofitoj kreiĝas ne nur en la konkurenco interne de unu branĉo, aŭ de unu lando, sed ankaŭ en la konkurenco de lando al lando. En varinterŝanĝo inter du landoj, la pli progresinta lando ĉiam gajnas, kaj ekspluatas la malpli progresintan (2) eĉ kiam estas libera interŝanĝo, kaj des pli se oni prikonsideras la perfortajn metodojn uzatajn de imperialistaj ŝtatoj, kapitaliste altevoluintaj, kontraŭ landoj ekonomie malpli fortaj.

Estas konate, ke Britio havis, je la mezo de l' pasinta jarcento, la komercan monopolon en la ekonomio de l' tuta mondo. En ĉiuj aliaj landoj ankoraŭ regis ĉefe la metiista produktado, kiam la teknika supereco de la britia industrio konkiris la mondmerkaton. Tiel la britia kapitalistaro havigis al si grandegajn superprofitojn, kiuj ebligis al ĝi, cedi al ĝia proletaro, almenaŭ al ties kvalifikitaj tavoloj, parton de la profito sub formo de pli altaj salajroj.

Engels tre frue rimarkis tiun tendencon. Jam la 7-an de oktobro 1858, li skribis al Marks:

> « La angla proletaro burĝiĝas pli kaj pli, kaj ŝajnas, ke tiu nacio, la plej burĝa el ĉiuj, volas finfine havi apud sia burĝaro burĝan aristokrataron kaj burĝan proletaron. Evidente, tio estas, iamezure, bone kalkulita flanke de nacio, kiu ekspluatas la universon. »

En la jaro 1882, Engels skribis en letero al Kautsky:

> « Vi demandas, kion la anglaj laboristoj pensas pri kolonipolitiko. Precize la samon kiel pri politiko ĝenerale. Tie ĉi ne ekzistas laborista partio, ekzistas nur konservemaj kaj liberalaj radikaluloj, kaj la laboristoj trankvile profitas kun ili el la kolonia kaj mondmerkata monopoloj de Anglio. »

*) Vidu la n-rojn 99, 102, 103 kaj 104.

(1) Vidu: « La Kapitalo », I-a vol., ĉap. X kaj XIII/3.
(2) Vidu: « La Kapitalo », III-a vol., 1-a parto.

En artikolo aperinta en 1885 en lingvoj angla kaj germana, Engels skribis :

« ... la industria monopolo de Anglio estas la pivoto de la ekzistanta angla socisistemo. Eĉ dum la daŭro de tiu monopolo la merkatoj ne povis plivastiĝi same rapide kiel la kreskanta produktiveco de la anglia industrio ; la krizoj ĉiudekjaraj estis la sekvo. Kaj nun novaj merkatoj ĉiutage plimaloftiĝas, tiom ke oni volas trudi eĉ al la negroj de l'Kongo la civilizon, kiu fluas el la kotontoloj de Manchester (Manĉester), el la argilaĵoj de Staffordshire (Stafordŝir) kaj el la metalaĵoj de Birmingham (Birmingam). Kia estos la sekvo se kontinentaj, kaj precipe amerikaj varoj elfluos kreskantamase, se la leona parto kontribuata nuntempe de la angliaj fabrikejoj al la provizumado de la mondo malpliiĝas de jaro al jaro ? (3) ... Kiom daŭris la industria monopolo de Britio, tiom la britia laboristaro partoprenis grade je la favoraĵoj de tiu monopolo... Jen la kaŭzo, pro kiu ekde la malapero de la owenismo (4), ne ekzistis socialismo en Anglio. Sekve de la disfalo de la monopolo, la angla laboristaro perdos tiun privilegian pozicion. Ĝi subite sin vidos ĝenerale — ankaŭ la favorigita kaj gvidanta malplimulto — malsuprenigita sur la saman nivelon kiel la laboristoj eksterlandaj. Jen pro kio socialismo ekzistos denove en Britio. »

Socialismo ekzistos denove en Britio ! Tion skribis Frederiko Engels, la kunfondinto de l' marksista teorio, en la jaro 1885 ! Kaj mi pensas pri la ĝenerala striko de majo 1926, pri la klasbataloj pliakrigitaj, pri la heroa luktado de la karbministoj, pri la konstanta krizo de anglia industrio sekve de l' usona kaj kontinenta (ĉefe franca kaj germana) konkurenco. Tion skribis Engels en periodo, kiam socialismo *ne* ekzistis en Britio kaj kiam la burĝaj profesoroj, pagitaj por mortigi la marksismon, sindone kaj ŝvitplene neniigis tiun diablan sistemon ĉiutage.

Hodiaŭ, el historia perspektivo, vidante, ke la teorio tiom « refutita » de la profesoroj kaj ŝajne nuligita de la faktoj, sin montras prava kaj neŝancelebla, ni povas nur rideti pri ilia infaneca fervorego kaj devas bedaŭri la tempon kaj energion perditajn por tiaj sensencaĵoj.

LUCIEN RÉVO.

(3) Tio estas skribita en 1885 ! Nun, kvardekunu jarojn poste, la okazo antaŭvidita de Engels fariĝis doloriga fakto.

(4) Skolo de la utopia socialisto Robert Owen (Oin). Vidu la antaŭan artikolon.

JUS APERIS :

KARL MARX
lia vivo kaj lia verko

Kompiltradukita de V. ELSUDO
90 pĝ. Prezo : 0.60 mk. g.

Mendu tuj ĉe Administracio de SAT
Colmstr. 1 - III, Leipzig

Antaŭmilitaj kaj postmilitaj sennaciuloj

(*Daŭrigo* *)

Montrinte do nur ĝian neeviteblecon kaŭze de neebleco tiama ekstariĝi ekster la kadroj de nacia kulturo, ni revenu al nia temo :

Kiaj estis la antaŭmilitaj sennaciuloj ? — Ĉu ili entute ekzistis ? — Jes, ili ekzistis. La potenca blovo de internacieca sento proletrevolucia ne unumomente ĉesis sian efikon. Ĝi longe influis ankoraŭ la Duan Internacion. La germanaj socialdemokratoj ekzemple uzadis longtempe la esprimon « Proletarier Deutscher *Zunge* » (en esperanta traduko kvazaŭ « Proletoj de germana *lango* », *ne lingvo*), volante per tio ekmontri la senkulpecon sian pro uzo de nacia lingvo, la nuran fiziologiecon de la lingva fenomeno, nenion komunan havanta kun la spirita nacieco de burĝaj klasoj. Ankoraŭ en la jaroj 1900-1905 la skribanto de ĉi-linioj legis en pol- germankaj ĉeĥ lingvaj socialistaj gazetoj de Silezio ĉefartikolojn pri naciisma problemo, kiuj entute sen honto povus reaperi nun kiel ĉefartikoloj en SENNACIULO aŭ *Sennacieca Revuo*. La samo estis ĉe la tiamaj grandaj ĉeforganoj socialistaj de Berlin, Vieno, Praha, Krakovo, Parizo, ktp. Sed baldaŭ ĉi vivresto de sennacieco devis foraperi el-inter la oficialaj partioj. Teorie ĝi restis nur ĉe kelkaj « ortodoksaj » marksistoj, ĉe kelkaj grupoj de anarkistoj kaj — fine — ĉe individuoj, kies sennacieco tamen troviĝis en la sama stato, kiel la internacieco de Marx, Bakunin, Kropotkin k. a., kiuj — spirite vere internaciaj, senigitaj je ĉiu nacieca, ŝovinisma sento, manke de unu lingvo internacia povis ekmontri sian internaciecon nur en *kelklingveco*, egaleco en la elekto de nacia lingvo skribaĵa aŭ parolata.

Kaj jen kia estis la fizionomio spirita de tia kelklingva « sennaciulo » antaŭmilita — fidela disĉiplo de Marx, Bakunin k. a. (La tre malmultnombran grupon de socialistoj esperantistoj antaŭmilitaj oni ne povas meti en la kalkulon).

— Al kiu nacio vi apartenas ? — mi demandas.

— Al neniu — sonas la respondo.

— Bele ; tamen, vi estas naskita kiel... ?

— Naskita kiel... ruso (aŭ polo, judo, germano, franco) — sed mi ne min sentas ruso.

— Tamen vi parolas kaj skribas ruse.

— Estas egale por mi — ruse, germane, france aŭ angle.

— Nu do, ĉu vi estas samtempe ruso, germano, franco kaj anglo ?

— Ne — sed estas por mi egale, kiun lingvon mi uzas. Mi estas internaciisto.

— Bone — kaj la italan kaj hispanan vi same estras ?

— Ne — ilin mi ne estras.

— Do — via internacieco estas limigita.

— Praktike, jes. Sed tial ĉiu konscia K-do devas lerni almenaŭ 1-2 fremdajn lingvojn, la ĉefeŭropajn.

— Kaj la ĥinaj, hindaj kaj japanaj K-doj, ĉu ili devas esti preterlasataj ?

— Ho, ĝi estas malfacila problemo. Nek mi nek la partio solvis ĝin ; do mi ne povas al vi respondi finece — mi nur konsilas ke vi lernu la francan, germanan kaj anglan lingvojn.

— Mi laboras dek horojn potage (ĉi konversacio okazis en Parizo en la jaro 1912) kaj ne havas tempon perdi 3-6 jarojn por lerni 2-3 novajn lingvojn. Kaj se eĉ mi lernus ilin, tio ne kontentigus min, ĉar mi ege dezirus legi ankaŭ italajn, hispanajn, rusajn, ĥinajn k. a. verkojn.

Kaj la interparolo transiris al alia temo.

Alifoje mi — tiame ankoraŭ neesperantisto — demandis mian poliglotan K-don : « K-do, ĉu vi aŭdis ion pri la internacia lingvo esperanto, kaj kion vi opinias pri ĝi ? »

Ho — estas ridindaĵo — artefarita konglomerato, ĵargono el ĉiuj lingvoj ; lingvo estas natura fenomeno kaj oni ne povas krei ĝin artifike. Ne indas okupi la kapon.

Mi obeis. Mi ne okupiĝis per ia vivnekapablaĵo — mi sekvis la instruon de mia pli klera K-do, kaj lernis, lernadis diligente la tri fremdajn lingvojn — ĝis kiam venis momento, jam postmilita, kiam iu alia, kompare malpli instruita K-do, hontigis min.

La konversacio iris la saman vojon :

— Al kiu nacio vi apartenas ?

— Al neniu.

— Tamen vi estas naskita kiel...

— Kiel polo. Sed estrante la lingvon internacian esperanto, mi estas kapabla interkomunikiĝi kun K-doj ĉiulandaj, ne bezonante lerni ilian lingvon. Antaŭe mi sentis min internaciisto nur teorie, ideale. Nun mi sentas min sennaciisto en la vera senco de ĉi-vorto same kiel mi estas senkonfesiulo, kvankam baptita en rom-katolika eklezio...

— Ĉu vi scipovas aliajn lingvojn krom la pola kaj esperanta ?

— Nenian. Mi ne bezonas. Se ĉiu lernus krom sia gepatra la internacian lingvon baldaŭ ankaŭ la naciaj fariĝus nebezonaj.

— Kaj vi ne sentas domaĝon, bedaŭron je malapero de nacia kulturo kaj ĝiaj apartaj belecoj ?

— Tute ne ; nova, tuthomara kulturo proleta anstataŭos ĝin kaj jam hodiaŭ mi estas preta ne elparoli nacilingve eĉ unu vorton, se nur ĉiuj K-doj jam komprenus esperanton.

Kaj la interparolo transiris al alia temo. Li — estis simpla laboristo. Mi — la tiel-nomata « duon-intelektulo » kun la « famo » de poligloteco, mi hontis ; eklernis esperanton kaj aniĝis al *Sennacieca Asocio Tutmonda ;* ĉesis la senfinan, malmultefikan studadon de fremdaj lingvoj — kaj hodiaŭ ekdeziris montri al niaj Gek-doj, kiaj estis la antaŭmilitaj kaj kiaj estas la nunaj, postmilitaj sennaciuloj.

JOAN SAVADO.

P. S. : Ĉar la naciiĝo de eŭropa kulturo trapasadis la vojon :

Nacia dinastio, nacia ŝtato, nacia lingvo kaj nacieca popolkulturo. Do la evoluo al nova, tuthomara popolkulturo devos sekvi la returnan vojon :

Sennacia ŝtato (komencis efektiviĝi en U. S. S. R.). (La antaŭmilita Aŭstrio, la pola multnacia ŝtato dinastia en Eŭropo, disfalis en apartajn naciajn ŝtatojn, pruvante la naturecon de sociologia evoluleĝo, menciita en la supra artikolo. Nun, kiam ĉiuj popoloj jam satiĝis per sia nacia « sendependeco », venas la tempo al internacia ŝtato proleta. La *pli klera* burĝaro sekvas la saman vojon en la Paneŭropa movado).

Sennacia lingvo (komencas efektiviĝi per esperanto).

Sennacia, tuthomara popolkulturo (komencas efektiviĝi per SAT).

*) Komenco en la n-ro 104.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

La « Fundamento de Esperanto » (1) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta *kontrolilo,* kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.

L.-L. ZAMENHOF.


(1) Mendebla ĉe nia Administrejo.

Sennaciula Radio-Paĝo

NOVA RADIO-STACIO EN LENINGRADO

Fine de julio komencis funkcii nova 10-kilovata radio-stacio en Leningrado. Ondolongo de la stacio 1.100 metroj.

La anteno estas fiksita sur tri lignaj mastoj kies alteco estas: du — po 100 metroj kaj unu — 143 metroj. La potenco estas grandigebla ĝis 15 kilovatoj. La tuta stacio estas konstruita en Leningradaj uzinoj.



La stacio estas facile aŭdebla en Skandinavio kaj apudbaltmaraj landoj. La unua esperanta disaŭdigo de la stacio okazis la 6-an de aŭgusto. Estis disaŭdigata la solena malfermo de nia VI-a.

Regula disaŭdigo okazas ĉiutage, krom ĵaŭdo, de la 6 ĝis la 9 h. laŭ MET (Mez-Eŭropa Tempo).

Se sufiĉe multaj eksterlandaj K-doj anoncos sin, ni sukcesos organizi regulajn esperantajn disaŭdigojn.

Pri aŭdebleco de la stacio eksterlandaj K-doj estas petataj skribi laŭ la adreso: « Radioperedaĉa », Gercen-str. 37, Leningrado, Sovet Unio. Ne forgesu noti en la komenco de la letero, ke ĝi estas en esperanto.

Geo. Teterin.



RADIO SUR LA TERGLOBO

Laŭ lastaj kalkuloj, 817 brodkastaj stacioj regule funkcias. El ĉi tiu nombro, 534 lokiĝas en Usono, la 283 aliaj estas dislokitaj en 57 landoj. Krom tiu nombro, 740 stacioj estas projektitaj aŭ nun konstruataj: 642 en Usono kaj 98 en diversaj landoj. Do baldaŭ estos 1.557 sendstacioj.

Unuavice staras Usono, poste Kanado (30 stacioj), — Aŭstralio, Britio kaj Hispanio (po 20), — Meksikio kaj Germanio (po 19), — Francio kaj Kuba (po 18), — Svedio 17, — Brazilio 13, — Argentinio kaj Finlando (po 10). La aliaj landoj posedas malpli ol 10 staciojn. En Sovetio la nombro de la radiostacioj kreskas tre rapide. Nune funkcias: Moskvo (410 m., 450 m., 1.010 m., 1.450 m.) Stravopol (570 m.), Astrahan (657 m.), Sverdlovsk (750 m.), Kiev (780 m.), Niĵni-Novgorod (780 m.) Iv. Voznesensk (800 m.), Gomel (900 m.), Minsk (950 m.), Voronej (950 m.), Rostov (1.000 m.). V. Ustjug (1.010 m.), Leningrad (1.100 m.). Entute estas 16 stacioj, kiuj regule disaŭdigas.

En Germanio, la potencoj de la stacioj Berlin, Hamburg, Leipzig, Breslaŭ, Frankfurt a. M., Stuttgart, Nurenberg kaj Koenigsberg estas 10 kilovataj, kaj la superstacio Laŭfenberg baldaŭ detronigos tiun de Daventry.

H. Nikollet (Lyon).



ESPERANTA RADIO KALENDARO

Ĉiumonate ni presigos liston de la stacioj, kiuj disaŭdigas esperante. Niaj legantoj estas petataj nin informi pri sanĝoj, ĉesoj, novaj sendoj, eĉ pri eblaj eraroj.

Horoj de Greenwich.

Ĉiutage:	
10 h. 45	Leipzig (452 m.), Dresden (294 m.)
Ĉiumonate, 3-an merkredon:	
22 h.	Barcelono (325 m.)
Lundon:	
10 h.	Dairen (Japanio) (395 m.)
17 h.	Moskvo (1.010 m.)
18 h. 10	Vieno (531 m.), Graz (397 m.)
18 h. 30	Stuttgart (446 m.)
19 h.	Minsk (950 m.)
20 h.	Romo (425 m.)
Mardon:	
0 h. 35	Cleveland (Usono) (273 m.)
2 h.	Minneapolis (Usono) (416 m.)
16 h. 20	Montevideo (270 m.)
17 h. 30	Leipzig (463 m.), Dresden (294 m.)
20 h. 10	Ĝenevo (760 m.)
Merkredon:	
17 h. 45	Madrido (340 m.)
21 h.	Gleiwitz (251 m.), Breslaŭ (418 m.)
21 h. 30	Zagreb (350 m.)
22 h. 15	Bilbao (418 m.)
Ĵaŭdon:	
18 h. 10	Vieno (531 m.), Graz (397 m.)
19 h.	Parizo (1.750), Parizo (458 m.) Gisborne (Nov-Zelando) Horo kaj ondlongeco nekonataj.
Vendredon:	
1 h.	New-York (258 m.)
16 h. 20	Montevideo (270 m.)
17 h.	Moskvo (1.010 m.)
20 h. 30	Toulouse (Francio) (260 m.)
Sabaton:	
17 h. 15	Dortmund (283 m.), Munster (410 m.) Elberfeld (259 m.)
17 h. 35	Berlino (513 m.), Berlino (571 m.)
21 h.	Bilbao (415 m.)
Dimanĉon:	
8 h. 30	Moskvo (1.450 m.)
9 h. 30	Moskvo (1.450 m.)
10 h.	Hamburg (392 m.), Hannover (297 m.), Bremen (279 m.)

H. N.

ATENTIGO

Ĉio koncernanta la Radio-paĝon, *estu senpere sendata al K-do H. Nicollet, 91, rue de Trion, Lyon (Ve) Francio, kiu estas responda pri la teknika parto. Li bezonas regulan ricevadon de « Radioljubielj » kaj « Experimental Wireless », interŝanĝe li sendos francajn radio-gazetojn.*

RADIO KAJ ESPERANTO

Ĉiudimanĉe, nia K-do Ĵavoronkov efektivigas esperantajn disaŭdigojn, aŭdeblajn en tuta Eŭropo pere de la Moskva stacio Komintern (1.450 m.).

De 8 h. 30 ĝis 9 h. (Horo de Greenwich) okazas esperanta kurso.

De 9 h. 30 ĝis 10 h., parolado aranĝata de la konata soveta gazeto « Radjoljubitelj ».

La SAT-anoj, kiuj aŭdos tiujn disaŭdigojn estas petataj skribi al K-do A. Vinogradov, ĉef-inĝeniero, Radiostacio de M. G. S. P. S., Bolŝaja Dmitrovka, Moskvo — pri la aŭdebleco.



Ĝis nun, 83 sendstacioj disaŭdigis esperantajn kursojn, konferencojn aŭ informojn.



Mi legis en « Amateur Wireless » artikolon pri nova ideo, kiu ricevas multajn adeptojn (laŭ diro de la gazeto):

Por simpligi la lingvajn malfacilaĵojn de la radiistoj, kiuj aŭskultas la fremdajn staciojn, oni povus krei vortareton entenantan nur kelkajn centojn da vortoj sufiĉajn por informbulteno. Tiuj vortoj estus elektitaj inter tiuj, kiuj estas similaj en la diversaj eŭropaj lingvoj. Tiamaniere, post 15 tagoj da studo, ĉiuj komprenus la informojn.


La direktoro de tiu gazeto ŝajnas ne koni nian lingvon. Niaj anglaj K-doj povus informi lin.

771.



RADIO JE LA SERVO DE SUBAKVIĜISTO

Komence de l' nuna jaro speciala teknika komisi germana eksperimentis submare apud la insulo Helgoland pri uzebleco de nove



eltrovita radioricevilo subakva. La provoj estis kontentigaj; en profunda loko oni povis aŭdi ne nur *radiogramojn* de la esplorŝipo sed brokastadon el la kontinento! Kiel anteno servas distranĉita drataro fiksita ĉe la kapo, la alia necesa ilaro troviĝas en la skafandro. La fotaĵo montras modernan skafandron kun radioricevilo ekspoziciita en Berlin 1926.

H. Muravkin.

TRA ESPERANTIO

Imitinda Ekzemplo

LA SAT-JUBILEO

Gekamaradoj!

Sennacieca Asocio Tutmonda jubileas pro sia kvinjara ekzistado. Okaze de ĉi tiu fakto la tutmonda SAT-anaro forĝas jubilean ĉenon ĉirkaŭ la mondo, alivorte: aranĝas libervolan monkolekton por nia asocio.

Gekamaradoj!

Ankaŭ ni, Nederlandaj SAT-anoj faru nian devon. Ni ne postrestu! Ĉiu el ni donu tiom, kiom li povas, ĉu grandan, ĉu malgrandan sumon, laŭpove.

Ni kolektu en niaj grupoj, inter esperantistaj K-doj, inter laborkolegoj, inter konatuloj, ktp., ktp.

Sendu monon al K-do Hoogervorst, Seringenstraat 6, Aalsmeer.

Kaj vi! K-doj ne-SAT-anoj!

Ankaŭ vi faru vian devon. Tio estas: aliĝu al la mondorganizo de proletoj esp-istoj. Vi abonu nian semajnan gazeton SENNACIULO, por kies plibonigo kaj pligrandigo ni strecas ĉiujn fortojn, kies abonprezon ni malaltigis.

Ne izolu vin, K-doj, sed kunbatalu en la armeo de l'proleta esperantistaro.

Resume, K-doj, ĉiu sendu monon, iĝu membro de SAT, abonu SENNACIULO-n! Vivu la proleta esperanto-movado!

VIVU SAT!

GPDB.

★

La ĉi supra alvoko aperis en Nederlanda Laborist-Esperantisto. *Ni publikigas ĝin kun la espero, ke tia bona ekzemplo estos imitata. Ĉiu K-do devas forte konscii, ke « S-ulo », kiu antaŭe jam estis la plej malmultekosta gazeto, povos daŭre esti liverata laŭ la nova, malaltigita prezo, nur se ni varbos 1.000 pliajn abonantojn. — Se ni ricevus 2.000 novajn abonojn, ni povus denove plimalaltigi la prezon!...*

Fervoriĝu pli kaj pli, K-doj! Via devo koincidas kun via profito.

NE PROKRASTU ĜIS MORGAŬ, KION VI POVAS FARI HODIAŬ.

POSTKONGRESAJ RIMARKOJ

Niaj proksimaj taskoj

Pli ol iu alia el niaj kongresoj, la VI-a permesas al ni, post mallonga rigardo sur nian pasintan laboron, direkti niajn okulojn antaŭen sur niajn estontajn taskojn. Post ni estas kvin laborplenaj jaroj, kronitaj de la sukceso de Leningrado. La glacio estas rompita: Gravaj laboristaj organizaĵoj, ĝis nun dubintaj pri la praktika valoro de esperanto vidis proprokule, ke nia movado estas potenca, ke nia lingvo estas vivanta, ke nia spirito ne estas utopia kaj iluziema, sed praktika kaj klaskonscia.

El tio rezultas, ke la malicaj blufaĵoj de anoj de « tutperfektaj » lingvosistemoj ne plu estas timindaj. Se ili ne sukcesas pruvi, per same forta kongreso kiel nia VI-a, ke ilia sistemo povas esti por la proleta batalado almenaŭ same praktike utila kiel esperanto, neniu atentos ilin plu. Ĉar tro klare nia kongreso montris nian realan forton al tiuj, kiuj ĝis nun ne estis sufiĉe informitaj.

Ankoraŭ du aŭ tri kongresoj kiel nia VI-a — kaj certe multaj gravaj laboristaj organizaĵoj mem rekomendos al siaj membroj efektive (ne surpapere kiel ĝis nun) la studadon kaj aplikon de esperanto! Ĉu tiu perspektivo ne permesas al ni esperi, ke tiam la interbatalado en la brusto de multaj SAT-anoj, inter *por* kaj *per* esperanta laboro, iom post iom ĉesos? La laboristaj organizaĵoj, partioj, sindikatoj, kulturasocioj ktp., ja mem propagandos esperanton!

★

Kelkaj el niaj K-doj estas eĉ ebriigitaj de la sukceso de nia VI-a. Ili jam sonĝas pri tre baldaŭa enkonduko de esperanto en grandajn laboristajn organizaĵojn. Jam ili revas pri grandaj kursoj en sindikatoj kaj partioj, pri grandaj laboristaj kongresoj internaciaj uzantaj nur esperanton kiel intertraktilon.

Ho, ne trorapidu! SAT havas kvinjaran historion sukcesplenan. *Post* kvin jaroj ni pri tiuj revoj jam povos diskuti pli serioge, kondiĉe, ke nova granda hombuĉado imperialista ne ĵetegos nin ree en teruran abismon.

Tamen ni jam nun devas praktike prepari la atingon de tiu celo. Ni eĉ ne deziru, ke morgaŭ iu granda kaj grava laborista organizaĵo sin turnu al ni, postulante instruistojn por esperantistigi siajn gvidantajn funkciulojn ĉiugradajn por plifaciligi al ili internaciajn rilatojn. Ĉu ni jam havas sufiĉe grandan nombron de spertaj, lertaj instruistoj? Ĉu la necesan kvanton da altkvalitaj lernolibroj, ekzercaroj ktp.? Ĉu ni jam havas la sciencan terminaron kiu permesus al ni traduki esperanten iun ajn plej malfacilan tekston ekonomian aŭ socisciencan? Ĉu ni jam disponas je necesa nombro da stenografistoj kaj maŝinskribistoj, nepre necesaj ĉe gravaj kongresoj? Kiom da demandoj — tiom da neoj.

Jen kion necesas prepari, serioze, senhezite energiege! Krom la daŭrigo de nia interfabrikeja korespondado, kiu estas la plej taŭga ilo por atentigi la respondecajn gvidantojn de la laborista movado pri la praktika utileco de nia lingvo, ni nun *pliprofundigu* nian laboron. Necesas plialtigi la procenton de la altŝtupaj kursoj por progresintoj en la ĝenerala nombro da esperanto-kursoj, por havigi al ni instruistojn.

Ni bezonas lernilojn taŭgajn por la instruado de ia speco de homoj, de laboristaj gvidantoj aŭ pli bone, de *sub*gvidantoj (ĉar gvidantoj mem havas tro da laboro por lerni lingvon). Tiuj proletaj politikuloj bezonas esperanton por difinitaj celoj. Ni ne povas devigi ilin lerni ekzemple la nomojn de ĉiuj zoologiaj aŭ botanikaj specoj, kiujn ili eble dum sia tuta vivo ne bezonos, sed ni devas al ili tuj doni la vortaron por ili plej necesan. Ni ne forgesu, ke tiuj K-doj ne havas multe da tempo, ke ili volas akiri esperanton plej rapide. Por akiri la necesan politikan terminaron, sufiĉas la legado de « S-ulo ». Sed por ke ili plej rapide akiru la pli teorian, sciencan terminaron ekonomian (al ili treege necesan), ni ne povas konsili al ili la legadon de ĉiuj verkoj marksistaj (aperintaj aŭ aperontaj en esperanto) por ke ili tie, perdante tempon, serĉu la necesajn vortojn. Pro tio oni bezonas krestomation, kiu enhavu sur minimumo da spaco maksimumon da tiaj esprimoj, koncentrigitaj en elektitaj ĉapitroj el elektitaj verkoj de l' scienca socialismo.

Ĉu tia traduklaboro, elĉerpo de ekzistantaj trezoroj de esperanto, kreado de novaj vortoj sur bazo de jam ekzistantaj radikoj, ne estus brilperspektiva agadkampo por tiuj K-doj, kiuj antaŭ nelonge nepre volis pliriĉigi nian lingvon per propraj elpensaĵoj kaj kiuj depost la Viena rezolucio obstine silentas?

Ni ĉerpu el nia lingvo per senĉesa tradukado la necesan teknikan terminaron, sen kiu la enkonduko kaj lernado de esperanto en seriozaj laboristaj rondoj fiaskus! Kaj finfine, ni organizu en grandaj urboj, kie nombro kaj elekteblo de taŭguloj estas pli grandaj, plej baldaŭ kursojn aŭ rondojn por esperanto-stenografado. Gek-doj havantaj la eblon, ekzercu esperantan maŝinskribadon!

Tiom da taskoj, nepre necesaj por fina sukceso. Ni eklaboru!

★

Studado de lingvo estas pli facila por junaj ol por maljunaj personoj. Esperanto fariĝos la sola lingvo de proletaj kongresoj ne morgaŭ, sed nur post sufiĉe longa tempo. Verŝajne ĝin kongresuzos ne la nuna maljuna, sed nur la sekvanta, la juna, nun kreskanta generacio de laborist-gvidantoj. Tial nia laboro en proletaj junularmedioj estos plej kaj plej necesa kaj plej fruktodona. Pro tio ni koncentrigu konsiderindan parton de niaj klopodoj kaj penadoj sur la junularon. Tiuj junuloj uzos esperanton, kiam la maljunuloj jam ne plu ĝin volos lerni kaj kiam la mezaĝuloj estos hezitantaj. SAT bezonas fortan, bone organizitan *junularfakon,* junularkorespondadon, korespondadon de estontaj soldatoj, por ke ili jam estu SAT-anece « infektitaj », kiam la pereinda militarismo de la imperialista burĝaro etendos sian sangan manon al ili.

Ni eklaboru! Kaj ni, « paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro »!

LUCIEN RÉVO.

★

LINGVAJ DEMANDOJ

Necesas trovi finfine kelkajn terminojn por konceptoj ĝis nun tre malofte renkontintaj en la esperanta verkaro. Temas pri terminoj de politika ekonomio.

Tiel longe kiel esperanto estis uzata ĉefe de la burĝaro kaj etburĝaro, la ekzistanta terminara ekonomia plene sufiĉis. Por komercadi kaj korespondadi pri praktikaj demandoj de varinterŝanĝo, nia lingvo estis sufiĉe preciza. Sed la ĉefa karakterizaĵo de burĝa ekonomio estas konfuzeco, kaj ĉe la

unuaj paŝoj al scienca pritraktado de iu ekonomia temo ni sentas mankon de koncizaj esprimoj; la vortoj, bildoj de la konceptoj, kvazaŭ disfluas sub niaj manoj. Same kiel la proletaro havas sian klasideologion diferençan de tiu de l' burĝaro, same ĝi bezonas sian propran vortaron ekonomian.

1) Plus-value (fr.), Mehrwert (germ.), Surplus-value (angl.), Plusvalore (it.), Pribavoĉnaja stoimostj (rus.); ĉu esp.: *plivaloro* aŭ *supervaloro?* Tiu termino esprimas la parton de la produktaĵo, kreitan de la salajrolaborulo *super* la valoro de la laborforto, super la salajro, restantan en la manoj de la kapitalisto. La vorto plivaloro ŝajnas same ĝusta, ĉar la laboristo produktas *pli* da valoro ol li ricevas sub formo de salajro. Kiun vorton elekti? Por tiu koncepto ni nepre bezonas unu solan terminon oficialan, kaj ne du.

2) Kiel traduki la vorton taux (fr.), Rate (germ.), Rate (angl.), Norma (rus.), ofte uzatan en la esprimoj: taux de profit, taux de la plus-value; Profitrate, Mehrwertrate; rate af profit, rate of interest; norma pribili, norma pribavoĉnoj stoimosti?

La vortaro de Grosjean-Maupin rekomendas *takso* aŭ *procento*. Sed la unua havas alian sencon, la dua estas tre malpreciza. Eble oni povus uzi, laŭ propono de K-do Yelland, la terminon *poprocento*. Aŭ la esprimon *normo*, kvankam ĝi ne estas tute trafa? Aŭ simple *la poo?* Aŭ *la poono?*

3) Oni scias, ke laŭ Marx la supervaloro dividiĝas je tri partoj: profito de entreprenisto (fr. profit, germ. Profit, angl. profit, rus. Pribil), procento de monpruntento (fr. intérêt, germ. Zins, angl. interest, rus. procent) kaj grunda rento (fr. rente foncière, germ. Grundrente, angl. ground rent, rus. zemelnaja renta). Pri la vortoj *profito* kaj *grunda rento* ne necesas diskuti ĉar ili estas sufiĉe klaraj. Sed la termino *procento* estas tro ĝeneralsignifa, ĉar finfine ankaŭ profito kaj rento kalkuliĝas laŭ procentoj, kaj tiam la vorto *procento* havas tute alian sencon. Krom tio, se oni elektus por la esprimo serĉita sub paragrafo 2-a (taux, Rate, rate) la terminon *procento*, la vorto fr. taux d'intérêt, germ. Zinsrate, angl. rate of interest, rus. uorma procenta estus esperanto: *procentprocento* aŭ procento de procento!

Mi malfermas la vortaron de Grosjean-Maupin por serĉi la esp. esprimon por la vorto *intérêt* kaj mi trovas: rento, profitparto, profito, utilo, bono. *Rento* estas neuzebla, ĉar ĝi signifas alian parton de la supervaloro; *profitparto* estas maltrafa, ĉar la la de ni serĉita vorto difinu parton de supervaloro kaj ne parton de profito; *profito* estas neuzebla pro la sama kaŭzo kiel rento; la esprimoj *utilo* kaj *bono* estas ĝeneralaj, sed ne ekonomiteknikaj terminoj.

Kiun vorton elekti? Ĉu ne estus rekomendinde uzi la vorton *intereso*, facilekomprenebla por franclingvanoj, anglalingvanoj kaj eĉ germanlingvanoj (kiuj ofte uzas *Interessen* apud *Zins)*.

Niaj K-doj diru sian opinion. L. R.

★

RESPONDO al SAT-ano 1187

— Kia diferenco estas inter la du vortoj: *ino* kaj *virino?*

— *Ino* estas multe pli vastsenca ol *virino* (aŭ *homino*). Ĉiuj *virinoj* estas *inoj;* sed ĉiuj *inoj* ne estas *virinoj*. La vorto *ino* ampleksas ne nur la homajn inojn, sed ankaŭ la inojn de ĉiu ajn speco de besto. *Hundino, katino, kamelino, elefantino, lacertino, kolubrino, fiŝino, skarabino,* ktp., estas *inoj*.

Virino estas aplikebla nur al la ino de homo; *ino* estas aplikebla ne nur al la virino (aŭ homino), sed al ĉiuj ajn bestaj inoj. Oni do ne devas uzi la simplan ĝeneralan vorton *ino* por montri virinon.

FAKULO.

KRONIKO

Germanio.

Regensburg. — La 4. k. 5. de sept. okazis ĉi tie la VIII-a konferenco de LEA-distrikto bavaria. Partoprenis 82 delegitoj el 15 grupoj krom la gastoj, ne sendis delegitojn 5 grupoj. Tagordo estis: Raportoj distriktaj kaj grupoj; kurs k. propagandaferoj; internaj aferoj kaj diversaĵoj. La raportoj de la delegitoj kaj distriktestraro montris, kvankam ne laŭnombran, sed tamen laŭkvalitan pliboniĝon kaj pliampleksiĝon de la scio esp-a en la vicoj de nia anaro. Post deŝarĝo, la malnova estraro denove estis per aklamo reelektita. Sabate vespere okazis publika ppopagandfesto bone vizitita ankaŭ de neespistoj. Dimanĉe posttagmeze la kunvenintaro, per motorŝipo ekskursis al « Walhalla » (simila al greka templo) enhavanta la bustojn de eminentuloj antikvaj, mezepokaj kaj modernaj; vespere la Gek-doj disiĝis esperante baldaŭan revidon! Al la K-doj en Regensburg ni dankas pro la bona kaj bela gastigado dumkonferenca. R. E. B. *1810*.

Nederlando.

Leiden. — La 13. sept. estas fondita en nia urbo SAT-Grupo (la dua en Nederlando!), al kiu tuj aliĝis 11 membroj. La kunvenoj okazos ĉiuĵaŭde en la Popoldomo. Oni studos laŭ « Petro » por pliperfektiĝo. Ĉiuj membroj aliĝos al SAT.

La estraro konsistas el: K-do. Timmers (Prezid), K-do Bendsveld (Kasisto) kaj K-do J. Massaar, Tollensstraat 4, Leiden (Ŝkret.).

★

LA SAT-APARATO SERVAS

Kelkaj tradukoj el SENNACIULO igis la Redakcion de l' bulgarlingva ĵurnalo *Saznanie*, eldonata en Detroit (Usono), disponigi ties paĝojn por esperantaĵoj. Ĉi sukceso estas ŝuldata al la internacia laborista korespondado, montranta mondskale la luktadon de l' Proletaro...

La legantaro de *Saznanie* ŝajnas esti nun tre favora al nia afero kaj mi estas invitita informi pri la esp. movado la anojn de la Bulgara-Macedona laborista eduka klubo en Detroit. Ĝoje mi akceptis ĉi inviton kaj tre baldaŭ mi povos konigi la ekziston de S.A.T. kaj ĝiajn celojn.

Bedaŭrinde, mi ne scias la anglan lingvon kaj ne povas pli larĝigi mian agadkampon, kvankam abundas tradukindaĵoj en « S-ulo » kiujn certe akceptus ankaŭ anglalingvaj gazetoj. SAT-ano *3647*.

★

Raporto de la Blankrusia Centra esperanto oficejo: Dum la pasinta jaro (de 23-5-25 ĝis 28-5-26) ni presigis en 13 blankrusaj gazetoj k. ĵurnaloj 135 leterojn el eksterlando, 112 informartikolojn 17 artikolojn pri esp-o, SAT k.a., 20 fot-ojn, ricevitajn el eksterlando. Dum la lastaj monatoj, junio-julio, ni presigis: 102 leterojn el eksterlando. 18 informartikolojn, 12 artikolojn k. fot-ojn. Ni estas interligitaj kun ĉiuj gravaj landoj.

★

MEMORNOTO

Represis el « Sennaciulo » la jenaj gazetoj: *A Zaznanie,* Detroit, 27-8-26: « Soveta registaro estas stabila kaj vivados » (n-ro 40) kaj « Laborista situacio en Hungario » (40); ankaŭ 20-8-26: « Henri Barbusse denove laŭdas esperanton » (42) kaj ankaŭ 13-8-26 « El Nederlando » (39). — *Basler Vorwärts*, Svisio, 3-7-26: « El Nederlando ». (39).

Enhavas notojn pri SAT. — *Sächsische Arbeiter Zeitung*, Germanio, 11 kaj 13-8-26, 6 kaj 13-9-26; leteroj pri la VI-a. de K-do O. Bässler. — *Sächsisches Volksblatt,* Saksio, 11-8-26: pri la VI-a. — *Proletarij,* Ĥarkov 29-8-26: pri SAT poŝtmarkoj. — *The Shop Assistant,* Anglio, 18-9-26. Artikolo de K-do Mark Starr pri la VI-a. — *Lansbury's Labour Weekly,* London 18-9-26: longa artikolo de K-do Mark Starr pri la VI-a.

Artikoloj, fotoj, salutoj ktp., pri VI-a SAT-kongreso aperis en sekvantaj leningradaj ĵurnaloj: leningrada kompartia organo *Leningradskaja Pravda* n-roj 161, 163, 174, 182, *Krasnaja Gazeta* Matena eldono n-roj 158, 176-182, Vespera eldono n-roj 164, 177-183, junulara ĵurnalo *Smena* n-roj 176, 179, 182. — *Le Droit du Peuple,* Lausanne, 16-3-26: pri la VI-a. — *Basler Arbeiter Zeitung,* Svisio, 4-8-26: pri la VI-a. — *Krasnaja panorama,* Leningrad, 27-8-26: pri la VI-a.

Enhavas tradukaĵojn el esperantaj leteroj. — *Naŝ Putj*, Kremenĉug, 1-9-26, 3-9-26, 5-9-26 kaj 9-9-26. — *Basler Arbeiter Zeitung,* Svisio, 5-8-26. — *Die Betriebsorganisation,* Frankfur, 15-9-26.

Enhavas priesperantaĵn artikolojn. — *Pravda,* Moskvo, 29-8-26. — *Trud,* Moskvo, 20-8-26.

ALVOKO

Laborista esperanta rondeto ĉe klubo je la nomo de Vajner en Sverdlovsk aranĝas en oktobro propagandvesperon kun ekspozicio. Ni petas al ĉiuj Gek-doj el la tuta mondo, ke ili sendu al ni salutleterojn kaj ekspoziciaĵojn. Ĉio estos kompencata.

Sendu al la jena adreso: u. Sverdlovsk. U. S. S. R. str. K. Libkneĥt, klubo Vajnera, al esperanto-rondeto.

Je la nomo de la rondeto:
P. ŜUBIN.

ALVOKO

Al artistoj-pentristoj el ĉiuj mondpartoj

En Erivano (ĉefurbo de Armenio) estas eldonota grava nacilingva art-revuo kun internacia karaktero, celanta *« la studadon profundan pri la arto de ĉiuj popoloj kaj ilian fratan ligon »*. Ĝi estos la unua revuo, ignoranta la naci- kaj regnolimojn kaj respegulanta la arton internacian, precipe proletlaboristan, la arton de l' *nova epoko*.

La revuo « Arto » deziras havi kunlaborantojn en ĉiuj landoj. Ĝi akceptas verkojn kaj korespondaĵojn en armena kaj esperanta lingvoj.

Ĉiuj artistoj estas petataj kunlabori al « Arto » per siaj pentroverkoj, priartaj artikoloj, priskriboj pri la nacia arto, ktp. Ĉiuj verkoj devas esti ilustritaj. Oni sendu ankaŭ artkronikaĵojn.

Ĉiu kunlaboranto ricevos po kvin ekzempleroj de la belega revuo.

Estonte la Redakcio uzos esperanton ankaŭ kiel peran lingvon por fari resumojn de ĉiuj artikoloj de l' revuo.

Do « Arto » povos fariĝi esperantlingva revuo! Kunlaboru ĉiuj! Ĉion sendu al SAT-peranto en Erivan laŭ jena adreso: *Gurgeno Sevak,* Novo-Cernovna, 9, *Erivan* (Armenio) U. S. S. R., aŭ senpere al la redaktoro: *Aran Jeremian, Erivan* (Armenio), Regna Muzeo.

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono: Gobelins 62-71